Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 5 Aprilo 2020



Ĉi-numere:

Flagoj en Tinĉjo.
Ĉu ekzistas la hipia flago?
Flagoj de Germanio
La flago de la Hispana Respubliko.
La Blazono de Nikaragvo.

# VENTO

## Veksilologia revuo en Esperanto

Eldonita de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Adresoj: cordoba@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editado en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
*Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.*

**ENHAVO** Paĝo

| | |
|---|---|
| Flagoj en Tinĉjo | 3 |
| Ĉu ekzistas la hipia flago? | 18 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 21 |
| La fotografaĵo de niaj legantoj | 24 |
| Flagoj de Germanio | 25 |
| La flago de la hispana respubliko | 28 |
| La angulo de la blazonoj: *NIKARAGVO* | 34 |
| Mallongaj Informoj pri V.E.N.T.O. | 37 |
| Kiel kunlabori kun VENTO | 38 |
| Humuro | 39 |

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj sur la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La solaj apogoj de nia revuo rilatas al la akcepto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta Homaro.*



# Flagoj en Tinĉjo

José M. Rodríguez (Hispanio)

La unua aventuro de Tinĉjo aperis en la jaro 1929 kaj ĝi okazis en la ĵus naskita Sovetunio. Postaj aventuroj disvolviĝis en Kongo (1930), Nordameriko (1931) kaj Barato (1932). En 1934 aperis *"La Blua Lotuso",* temas pri unu el la plej altaj pintoj en la verkaro pri Tinĉjo. Pro la fakto, ke kunlaboris kun Hergé, la aŭtoro de la komikso-libraro, la juna ĉina studento Zhang Chongren, *"La Blua Lotuso"* estis tre bone dokumentita kaj ĝia celo estis forigi ĉiajn kliŝojn ekzistantajn pri la tiama ĉina kulturo. La libro ankaŭ estas kritiko kontraŭ la rasismo kaj la koloniismo, tre malsimila do, al la idearo aperinta en *"Tinĉjo en Kongo"*, krome Hergé en *"La Blua Lotuso"* denuncas la militan intervenon de Japanio en Ĉinio.

Post *"La Blua Lotuso"* la aventuroj de Tinĉjo estas malsimilaj. Ĝis tiam li vojaĝis en ekzistantajn landojn, tamen poste, la aŭtoro preferis krei siajn proprajn landojn, tiamaniere li povis eviti malfavorajn opiniojn de legantoj kiun plendis pro la pozicio de la aŭtoro rilate politikajn sistemojn tiam ekzistantaj. Tamen tiu opinio de Hergé ekzistas, ĝi estas klare videbla malgraŭ la ŝanĝo de nomo de ŝtatoj kaj reĝimoj. Sendube krei paralelan mondon estas la plej efika maniero paroli pri la realo.

Do, Hergé kreis novajn ŝtatojn en siaj libroj kaj kompreneble ĉiuj ili havis kaj flirtis siajn proprajn flagojn kaj simbolojn. Jen ili:

- **SILDAVIO**


Ĉi tiu lando troviĝus en Eŭropo, pli-malpli proksime al la nuntempaj Aŭstrio kaj Slovenio. Ĝi aperis unuafoje sur la libro “*La Sceptro de l’Reĝo Ottokar”* en la jaro 1939 kaj poste ankaŭ, sur la libroj *“Celo: la Luno”* (1953); *“Esplorantoj sur la Luno”* (1954) kaj *“La Afero Sungirul’ ”* (1956).

Sildavio sendependiĝis en la 13-a jarcento el Bordurio, lando ankaŭ pripensita de Hergé. Tamen, Bordurio neniam rezignis okupi ĝin denove. Pro la fakto, ke Hergé parolas pri ekzistantaj problemoj sed en ne-realaj scenejoj, oni povus aserti, ke la deziro aneksi Sildavion fare de Bordurio similas al la germana *Anchluss* de Germanio rilate Aŭstrion.

La nigra pelikano estas la simbolo de la regno. Iuj opinias, ke la flago ja tre similas al la albana standardo, verdire ambaŭ ŝtatoj ne estus malproksimaj el la geografia vidpunkto.



Flago de Sildavio



Flago aperanta sur la libro

- **BORDURIO**


Bordurio troviĝas apude al Sildavio kaj ĝi neniam rezignis perdi la regnon de la nigra pelikano. Do, Bordurio ĉiam enmiksiĝas en la internajn aferojn de Sildavio. En *"La Sceptro de l'Reĝo Ottokar"* Bordurio reprezentas la faŝismajn ŝtatojn, eĉ la nomo de la tiama prezidento de Bordurio "*Mussler*" estas mallongigo de la nomoj *Mussolini* kaj *Hitler*, pintoj de la tiama faŝismo en Eŭropo, memoru, ke la libro aperis en la jaro 1939.

La borduria flago flirtas sur neniu komikso el la serio, tamen ĝi aperas desegnita sur aviadilo de la aera armeo de Bordurio. Oni povas dedukti, ke temas pri la flago de Bordurio pro la fakto, ke Hergé ofte aperigas naciajn flagojn sur la vostoj de aviadiloj, tio sama okazas en *"La Lando de Nigra Oro"* (1950) rilate alian landon pri kiu oni poste parolos. Tamen, ĉi tiu flago ne estis sama sur ĉiuj eldonoj de la libro. Tiel, sur la unua eldono de la jaro 1939 la flago aperanta sur la borduria aviadilo estas jena:



Tamen, la flago ŝanĝiĝas post la eldono aperinta en la jaro 1947 laŭ jene:








Borduriaj avidadiloj. Maldekstren el la albumo *"La Sceptro de l'Reĝo Ottokar"* eldono de 1939. Dekstren, sama albumo de la jaro 1947.

Pro aferoj rilataj al la tekniko pri presado kaj represado de la libroj, Hergé devis reeldoni kelkajn librojn kaj tiam li profitis por ŝanĝi kelkajn desegnaĵojn, inter ili tiuj de la aviadiloj kie aperis la borduria flago. Sendube sur tiu versio desegnita en la jaro 1939 Hergé deziris similigi la borduriаn flagon al tiu de la nazia Germanio, tamen post la represo de la libro en la jaro 1947, kiam tiu politika reĝimo jam malaperis, Hergé decidis modifi la flagon.

La ŝtato Bordurio estos ree la scenejo de postaj aventuroj de Tinĉjo, post tiu unua de *“La Sceptro de l’Reĝo Ottokar”* (1939), tiel ĉi tiu lando denove aperis sur la libro *“La Afero Sungirul’ ”* (1956). Kompreneble sur tiu libro publikigita post la dua mondmilito, Bordurio ne aperas jam kiel faŝista ŝtato, Hergé aligis Bordurion al tiuj eŭropaj ŝtatoj kiuj post la dua mondmilito restis post la “ŝtal-kurteno” sub la influo de Sovetunio. Tamen la komunismo estas anstataŭgita de personisma politika reĝimo nomita “lip-harismo” aŭ “mustaĉismo”. La ĉefurbo de Bordurio aperas kun grandaj statuoj kiuj omaĝas la prezidenton *Plesckzy Gladz,* kies vizaĝo, kompreneble, estas ornamita per granda lip-haro, pro tio la nomo de la politika reĝimo. Ĉiuj en Bordurio portas similan lip-haron, ĉar ĉiuj devas sekvi la instruojn de la gvidanto de la ŝtato. Kompreneble ankaŭ la flago tion reprezentas:



Flago de Bordurio sub la prezidenta reĝimo de Plesckzy Gladz

Tamen, oni devas averti, ke aliaj *tinĉjo-amantoj* proponas alian flagon por la ŝtato Bordurio. Temas pri la sama lip-haro, tamen kun ruĝa fono, simile al ĉi tiu:



Flago de Bordurio laŭ aliaj *tinĉjo-amantoj*

Pro la fakto, ke temas pri persona opinio de la aŭtoro de ĉi ti artikolo, mi devas pravigi mian argumenton. Tiel, mi iru en la originalan fonton, tio estas la albumo *"La Afero Sungirul'* ". Sur ĝi aperas jena bildo:




Se ni rigardas atente la kolorojn de la flagoj flirtantaj sur la konstruaĵo, ĝi tute similas al la koloro de la oranĝa aŭtobuso, kaj samtempe ĝi estas malsimila al la ruĝa koloro de la malantaŭa parto de la aŭtomobilo kiu aperas dekstre de la bildo. Do, la flago ne estus ruĝa sed oranĝa.

- **SANTEODORO**

Ni iru nun en la sud-amerikan kontinenton. Tie, Hergé lokigas novajn ŝtatojn tute similaj al aliaj jam ekzistantaj, memoru ke la aŭtoro de Tinĉjo parolas pri realaj aferoj sed en inventitaj scenejoj. Temas pri la landoj *Santeodoro* kaj *Novo-Riko*, aperantaj sur la komikso-libroj *"La Rompita Orelo"* (1937) kaj *"Tinĉjo kaj la Pikaroj"* (1976).

Geografie ili povus esti situitaj proksime al rivero Amazono, kvankam pro la konflikto ekzistanta inter ambaŭ landoj, ili memorigas Bolivion kaj Paragvajon. Hergé eĉ mencias pasintan militon inter ambaŭ landoj pro teritoria disputo en regiono nomita *"Granda Ĉapo"*, verdire okazis milito inter Bolivio kaj Paragvajo dum la 3-a jardeko de la pasinta jarcento nomita "Ĉak-milito".

Jen la flago aperanta sur *"Tinĉjo kaj la Pikaroj:*





Flago de Santeodoro

En ĉi tiu lando disvolviĝas lukto inter du militestroj, la generaloj Tapioko kaj Alkazar. En *"La Rompita Orelo"* oni diras ke la armeo de Santeodoro havas 3.487 kolonelojn kaj nur 49 kaporalojn. La generalo Tapioko ricevas la helpon de Bordurio, eble pro tio la oficiala aŭtomobilo de la prezidanto portas jenan flageton:





La aŭtomobilo de la Prezidento Tapioko en *Tinĉjo kaj la Pikaroj*

- **NOVO-RIKO**

Novo-Riko estas najbara, kaj foje malamika, lando de Santeodoro. La nomo de la ĉefurbo *Sanfación*, tute similas al tiu de la ekzistanta urbo *Asunción* en Paragvajo.

Rilate la flagon de Novo-Riko la koloroj ŝanĝiĝis post la re-eldono de la komikso-libro, kiel jam okazis kun tiu de Bordurio. Sur la una eldono de *"La Rompita Orelo"* en la jaro 1936 aperis jena flago:







Post re-eldonoj la flago jam aperas kun la koloroj inversigitaj laŭ jene:




- **ĤEMEDO**

Temas pri malgranda araba emir-lando, ĝi troviĝas en la Araba duoninsulo apud la Ruĝa Maro. La lando aperas sur la albumoj *"La Lando de Nigra Oro"* (1950) kaj *"Koakso Surŝipe"* (1958). La plej grava ekonomia rimedo de Ĥemedo estas la petrolo, tamen ĝi ankaŭ estas la bazo de preskaŭ ĉiuj problemoj de la lando. La flago de ĉi tiu lando estas videbla sur la vosto de la aviadiloj kaj sur la tankoj de ĝia potenca armeo en *"La Lando de Nigra Oro"*.





Verŝajne, la mar-armeo de Ĥemedo havas propran flagon, kiu flirtas sur la ŝipoj, ĝi reprezentas ankron, jen ĝi:








- **FLAGOJ EN LA ALBUMO *"LA FALSTELO"***

Specialan ĉapitron pri la flagoj en la aventuroj de Tinĉjo oni devas dediĉi al tiuj aperantaj sur la albumo *"La Falstelo"*. Laŭ la intrigo de la libro aerolito falas sur la teron, post la falo la Eŭropa Fondaĵo pri Sciencaj Esploroj decidas organizi ekspedicion por vojaĝi en la arktan oceanon, tie troviĝas la restaĵoj de falita aerolito. Al la teamo sendita de la Fondaĵo apartenas aro da prestiĝaj profesoroj kaj kompreneble, ankaŭ Tinĉjo kaj la Kapitano Hadoko.

La celo de la ekspedicio estas okupi la insulon nome de tiu sciencia institucio kaj tio plenumiĝus post la starigo de flago sur la aerolito mem. Interkrampe estas necese diri, ke la okupo de ter-peco kiu estas nenies propraĵo, kiel tiu insulo naskita post la falo de la aerolito, sendube estas plenumita post la starigo de nacia flago, tamen

tiu okupo kaj ebla posta reklamado de la teritorio nur povus esti plenumita de ŝtato mem, ne de internacia sciencia organizo kiel la Eŭropa Fondaĵo pri Scienciaj Esploroj, tamen, kompreneble, ni troviĝas antaŭ komikso-libro kaj ne antaŭ volumo pri Internacia Juro.







Nu, alia ekspedicio, financita de la usona bankisto Blumenstein eliras el usona haveno por okupi tiun saman insulon. Rilate ĉi tion okazas ion abunde ja pritraktita de la *Tinĉjo-amantoj*, sur la unua versio, aperinta de *"La Falstelo"* de la jaro 1942 kaj kiam Hergé laboris en la ĵurnalo *Le Soir* en la urbo Bruselo okupita de la nazioj, tiu ruza bankisto estas nomata per juda nomo (Blumenstein) kaj ĝi eliras el usona haveno.

Tamen, post la dua mondmilito, kaj okaze de re-eldono de la albumo, Hergé decidas ŝanĝi kelkajn aferojn de la intrigo. Tiel la nomo de la ruza bankisto kiu deziras okupi la insulon ŝanĝiĝas per "Bohlwinkel", ĉar la antikva nomo ŝajnis tipe jud-devena. La aŭtoro ankaŭ modifis la havenon el kie eliris tiun duan ekspedicion, oni anstataŭigas usonan havenon per alia de la lando *Sao-Riko.*

Pri ĉi tiu nova lando estas konata nur tio, ke el tiea haveno eliris la ekspedicio kiu konkuros kun tiu de Tinĉjo. La anstataŭigo de la usona ekspedicio pere de alia elirita el Sao-Riko ankaŭ videblas en la uzo de la flagoj, laŭ jene:




La usona flago aperas sur la unua eldono de *"La Falstelo"*. Okaze de reeldono oni uzis la flagon de nova ŝtato Sao-Riko.



Flago de Sao-Riko


Alia flago aperanta en ĉi tiu albumo estas tiu de la ŝipo *Aurora*. Temas pri la ŝipo per kiu vojaĝas la ekspedicio de Tinĉjo, jen bildoj pri tiu ŝipo:




Prua flago en la ŝipo *Aurora*



Puba flago en la ŝipo *Aurora*






La puba flago en ŝipoj, tiu kiu troviĝas en la malantaŭa parto de la ŝipo, montras la landon kie la ŝipo estas enregistrita. Ĉi-kaze, Hergé aperigas neniun nacian flagon, sed tiun de la sciencia asocio kiu organizas la ekspedicion, tio laŭ la leĝoj de la navigado ne estus ebla.

Rilate la pruan flagon, tiu kiu aperas sur la antaŭa parto de la ŝipoj, ĉiu ŝtato difinas ĝin, ĝenerale surbaze de la nacia flago aŭ blazono, kvankam ne ĉiam simila al ĝi. Do, la prua flago de la ŝipo *Aurora* apartenus al kelka ŝtato, kvankam verdire ĝi ne estus la nacia flago de tiu ŝtato. Sur la albumo *"La Falstelo"* oni ne mencias la naciecon de la ŝipo *Aurora*, nek de kie ĝi eliras. Do, ne estas eble koni al kiu ŝtato inventita de Hergé ĝi apartenus.

Kiel dirite flago ludas gravan rolon en ĉi tiu albumo, pro la fakto, ke Tinĉjo devas starigi la flagon de FERS (la Eŭropa Fondaĵo pri Scienciaj Esploroj) sur la restaĵoj de la aerolito. Kompreneble nia heroo, post multaj problemoj, aventuroj kaj riskoj, sukcesis.



***VENTO*** estas la sola revuo en esperanto kiu pritraktas flagosciencajn aferojn.
Kunlaboru kun ni !

cordoba@esperanto.ac

# Ĉu ekzistas la hipia flago ?


La hipia movado naskiĝis ĉe junularaj etosoj en Usono dum la jaroj ’60 de la pasinta jarcento. Ĉi tiu movado rifuzis la morojn de tiu konservativa socio, la frenezan konsumadon kaj ĝi celis al senperforto, libereco de sinvestado kaj de seksaj rilatoj.

Verdire, ne ekzistis oficiala flago de la hipia movado, tamen sur preskaŭ ĉiuj flagoj flirtitaj de hipioj aperis ronda simbolo kiu ekde tiam ligiĝas al tiu kontraŭ-kultura movado. Temas pri la simbolo kreita de Gerald Holtom.




Ĉi tu simbolo aperis unuafoje okaze de protesto kontraŭ la nukleaj armiloj en Londono en la jaro 1958 kaj, kiel dirite, la aŭtoro estis la dezajnisto Gerald Holtom. Li decidis krei simbolon por apogi kampanjon favore al nuklea malarmado, en la angla lingvo *Nuclear Disarmament* kies mallongigo estas N D.

Surbaze de la per-flaga alfabeto elpensita por komunikoj inter ŝipoj, Holtom prenis la flagajn simbolojn por ambaŭ literoj, tio estas: *N* kaj *D,* laŭ jene:


N


D

La dezajnisto supermetis ambaŭ linioj: “ ^ ” kaj “ | ” kaj li fermis ilin ene de cirklo, laŭ la jena rezulto:



Bayard Rustin, aktivisto cele la homajn rajtojn de la nigra minoritato en Usono, ĉeestis tiun manifestacion en Londono en la jaro 1958 kaj revene en Nord-amerikon li ekuzis ĝin kiel simbolon de la paco en la protestoj kontraŭ la Vjetnama milito. En la jaro 1969 la Societo “John Birch” publikigis artikolon kun la aserto, ke la simbolo de la paco reale temis pri satana signo. Ĉi tiu societo estas usona politika premgrupo, kiu aktivas kontraŭ komunismo kaj por limigita registara povo, ĝenerale ĝi havas reputacion kiel radikale dekstrisma.

La artikolo ricevis tiom da malfavoraj kritikoj, ke la simbolo populariĝis kaj tiel la hipia movado ekuzis ĝin amase kontraŭ ĉiuj militoj kaj perfortoj. De tie, ĝi fariĝis simbolo de la paco kaj la amo, idealoj defenditaj de la usona hipia movado.



Memoru, ke V.E.N.T.O.

(Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo)

deziras esti la faka asocio de Esperanto-Movado rilatanta al flagoscienco. La aliĝo al la asocio estas tute senpaga. Estontece, se oni atingas sufiĉan nombron da aliĝintoj, ni petos nian eniron en UEA-n kiel fakan asocion. Por aliĝi vi nur devas sendi mesaĝon tiu-sence al nia adreso: cordoba@esperanto.ac

# Lastaj informoj pri Flagoj

## Flago de la Spaca Komando de la Usona Armeo.

La pasintan monaton aŭguston la usona Prezidento Donald Trump anoncis la ekigon de nova branĉo en la usona armeo, la spaca komando, kies celo estos protekti la usonajn interesojn en la spaco. Laŭ la Prezidento Trump la spaco, estontece, povas esti nova batal-scenejo, kaj pro tio estos necese krei specialan grupon en la armeo.

Okaze de ĉi tiu anonco la Prezidento havigis al militestro de tiu nova branĉo la flagon de la spaca komando de la usona armeo.



# Disputo pro la Naga Flago en Barato.

La naciista movado de Nagalando, kiu dum jardekoj luktis por la sendependiĝo de la teritorio, ekigis por-pacajn renkontiĝojn kun la barataj aŭtoritatuloj. Nagalando estas subŝtato en nord-orienta Barato, tie malpli ol 10% el la loĝantaro estas hinduoj kaj ekde la sendependiĝo de Barato ĉi tiu regiono sopiris ankaŭ sendependiĝi. Okaze de la balotadoj al la barata parlamento en la jaro 1952 la naga loĝantaro bojkotis ilin. Poste, ili rifuzis ankaŭ pagi impostojn kaj ĉeesti baratajn lernejojn.




Pri la uzo de la flago de Nagalando kverelas Barato kaj la nagaj naciistoj

En la jaro 1963 oni subskribis akordon inter la barata registaro kaj kelkaj nagaj sendependaj frakcioj kaj oni decidis la starigon de la ŝtato Nagalando ene de la Barata Unuiĝo. En 1980 aperis gerila movado kiu luktis cele la sendependiĝon de la teritorio. En la jaro 2015 oni subskribis akordon laŭ kiu la nagalanda registaro rajtis plenumi konkretajn kompetencojn kaj havi propran buĝeton. Tamen la afero disponi pri propra konstitucio kaj nacia flago ankoraŭ ne estas solvita. Laŭ la reprezentantoj de la nagaj naciistoj, la agnosko de propra konstitucio kaj flago ja estas rajto de la naga popolo kaj cele al tio oni devus trovi honorindan politikan solvon.

## Flago tipe skandinava en la nordo de Skotlando.

Insulo Suda *Uist* (*South Uist* en la angla kaj *Uibhist a Deas* en la skot-gaela lingvo) adoptis flagon kiu sekvas la modelon de la skandinavaj flagoj. Ĉi tiu insulo troviĝas en la regino Foraj Hebridoj, nordokcidednte de Sktolando. Oni dezajnis ĉi tiun flagon en la jaro 2003 kaj post pli vasta uzado oni oficialigis ĝin per publika ceremonio.






## La Usona Flago en uniformoj kaj aviadiloj, ĉu inversigita?

Ofte aperas usonaj militistoj en televidaj informoj aŭ filmo, la flago alkudrita al ties uniformoj, kiam ĝi troviĝas sur la manikoj, aperas inversigita. Ĉu temas pri eraro? Tute ne!






La usona flago, se ĝi flirtas apud masto, devas aperi kun la blua rektangulo plena je steloj apud tiu masto, tamen se la flago troviĝas sur moviĝantaj objektoj, la blua rektangulo devas esti batita de la vento, se inverse la moviĝanta objekto ŝajnus marŝi malantaŭen. Do, se la flago troviĝas sur la maniko de uniformo, la blua rektangulo devas aperi supren dekstren kaj ne maldekstren. Same okazas rilate la flagon sur la aviadilo de la usona prezidento.

## La fotografaĵo de niaj legantoj



La Erasmus-studantaro estas bona diskonigilo de la flagoj de urboj, regionoj kaj landoj de Eŭropo. Tutcerte, en tiu domo de Madrid (Hispanio) loĝas studanto de la regiono Sicilio, deziranta montri la senduban belecon de sia flago.

*Fotis José María Rodríguez Hernández. Monato majo 2019 en Madrido (Hispanio).*

# Flagoj de Germanio

Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)

Germanio (aŭ Germanujo) estas lando en Eŭropo. La historio de Germanio estas fascina kaj kompreneble dume okazis ŝanĝoj en ĝiaj flagoj. Jene, ni vidos la flagojn, kiuj reprezentis la landon ekde la Germana Regno *(Deutsches Reich).*

Dum la Germana Regno (1871 – 1918) flirtis jena flago:



La koloroj estis elektitaj tiel: nigra pro la flago de Prusio, ruĝa pro la Hansa Ligo kaj blanka pro Prusio kaj la Hansa ligo. Indas diri, ke tiu flago samaspektas al tiu de la Nord-germana Federacio (*Norddeutscher Bund*). Post la Unua Mond-milito, la Vajmaran Respublikon oni proklamis. Dum tiu tempo, ĉi tiu flago estis tiam uzata de la ministro pri eksteraj aferoj.


Kiel dirite, en la jaro 1918 oni proklamis la Vajmaran Respublikon *(Veimarer Republik),* tamen tiu nomo nur estis uzata de la historiistoj, ĉar la nomo de la ŝtato daŭre estis Germana Regno *(Deutsches Reich).* Tiu nomo "Vajmara Respubliko" devenas de la urbo Vajmaro (*Wiemar),* kie oni proklamis unue la Respublikon. Ŝanĝo de reĝimo ofte postulas novan flagon, konsekvence oni oficialigis novan flagon:



Flago de Germanio dum la Vajmara periodo

Ĉi tiu flago estis jam uzita antaŭe, ĝuste dum la revolucio de la jaro 1848. La koloroj nigra, ruĝa kaj ora estis elektitaj surbaze de la uniformoj de la germanaj soldatoj *(Freikorps)* dum la Napoleonaj Militoj. En la jaro 1933 Adolf Hitler estis la nova kanceliero *(Reichskanzler)* de Germanio kaj la konsekvencoj de tiu nomumo venis tuje. Oni ŝanĝis, kompreneble, la germanan flagon:





Kial ekzistis en tiu momento du flagoj? Mi devas klarigi unuamomente la situacion: de la jaro 1933 ĝis 1935, la maldekstra flago estis uzata kune kun la nazia flago (dekstren). En la jaro 1935 tiu estis malpermesata, do, la nura oficiala flago estis tiu nazia. Kial tiaj koloroj? Blanka pro la naciismo kaj ruĝa kiel provokacio al socialistoj. La svastiko reprezentas la arjan devenon.

Post la Dua Mondmilito, oni forigis la nazian flagon tuj. Tamen la internaciaj leĝoj postulas, ke ŝtato devas havi flagon kie identigilon. Do, oni deklaris oficialan jenan flagon inter la jaroj 1945 kaj 1949, temas pri la pendonon C *(C-Doppelstander)*



Oni sufiĉe bone konas, ke Germanio disiĝis en du partojn post la Dua Mond-milito: Germana Demokratia Respubliko *(Deutsche Demokratische Republik)* kaj Federacia Respubliko Germanio *(Bundesrepublik Deutschland)*. Ambaŭ partoj unuiĝis en la jaro 1990. Jen la flagoj de tiuj du ŝtatoj:



Flago de Federacia Resp. Germanio



Flago de Germana Demokratia Resp.

# La flago de la Hispana Respubliko

Dum la kelk-jarcenta historio de la regno-lando Hispanio nur du-foje la politika sistemo de la ŝtato estis la respublika reĝimo. Tio okazis dum la 19-a jarcento, inter la jaroj 1873 kaj 1874 kaj duafoje, jam en la 20-a jarcento, inter la jaroj 1931 kaj 1939.

La hispanan flagon oni adoptis en la jaro 1785, unuamomente ĝi temis nur pri ŝipa flago, sed meze de la 19-a jarcento dekreto de la reĝino deklaris ĝin la oficialan standardon de Hispanio. La du-kolora flago ruĝa kaj flava restis kiel hispana standardo ekde tiam, escepte dum la respublika reĝimo ekzistanta inter la jaroj 1931 kaj 1939.

**La Unua Respubliko en Hispanio 1873 – 1874.**

Okaze de la proklamo de la unua respubliko en Hispanio, kelkaj politikistoj proponis forviŝi ĉiujn memoraĵojn pri la monarkio ĝis tiam ekzistanta, tio ankaŭ rilatis al la flago. Do, kelkaj respublikaj partioj proponis novan flagon por la nova respubliko, jen kelkaj el tiuj proponoj:

- Propono de la Respublika Komitato:



- Propono de la Popola Urbodomo de Madrido. Ĉi tiu flago jam estis uzita de tiuj kiuj defendis la respublikan idearon kontraŭ la monarkio. Ĝi eĉ flirtis dum kelkaj tagoj ĉe la hispana parlamento:



- Eĉ oni proponis la uzon de la tri-kolora flago tre simila al tiu franca, ĉar la franca politika idearo estis sekvinda modelo por la hispanaj respublikanoj:



- La federalistaj respublikanoj proponis jenan flagon, tie aperas 15 blankaj steloj, ili reprezentas tiujn 15 regionojn federaciitajn en la Hispana Respubliko:



Tamen, la propono pri ŝanĝo de la hispana flago dum tiu unua respublika eksperimento inter la jaroj 1873 kaj 1874 prokrastiĝis, do dum tiuj du jaroj la oficiala flago restis tiu du-kolora, ruĝa kaj flava¸kun blazono simila al tiu de la monarkio, kvankam malaperis la reĝa krono.



Flago de la Hispana Respubliko 1873 - 1874

En decembro de la jaro 1874 la generalo Martínez Campos ribelis kontraŭ la respubliko kaj li proponis la surtronigon de la princo Alfonso la 12-a, filo de la eksa hispana reĝino. En la monato januaro de 1875 la hispana parlamento kronigis lin.



Hispana flago post 1874

## La Dua Respubliko en Hispanio 1931 – 1939.

Oni devone proklamis la respublikon en Hispanio en la jaro 1931. En la monato aprilo la registaro de la hispana monarkio kunvokis municipajn balotadojn, la rezulto en la plej grandaj urboj estis tute favoraj al la respublikaj partioj. La reĝo Alfonso la 13-a komprenis, ke li ne havis jam la apogon de la hispana popolo kaj li decidis foriri en Italion. La 14-a de aprilo 1931 oni proklamis oficiale la hispanan respublikon.

Jam unu tagon antaŭe oni hisis la flagon de la Hispana Respubliko en la urbodomo de la vilaĝo *Eibar* en la bizkaja provinco en la nordo de Hispanio. La nova flago estis tiu uzita de antaŭ kelkaj jaroj de la respublikaj partioj. La flago oficialiĝis okaze de la Respublika Konstitucio aprobita en la jaro 1931, tiel oni decidis, ke la flago estus tri-kolora: ruĝa, flava kaj viola. La blazono iomete ŝanĝiĝis, ĝi estis tiu de la hispana regno-lando, tamen oni anstataŭis la reĝan kronon per alia nomita "*kastela krono*".



Flago de la Hispana Respubliko
1931 - 1939




Blazono de la Hispana Respubliko
1931 – 1939

Kial aperis la viola koloro en la flago? Nu, la dekreto aprobanta la novan flagon asertis jenon:

*"Hodiaŭ faldiĝas la nacia flago aprobita meze de la 19-a jarcento. Oni konservas du kolorojn, tamen oni aldonas novan trian, kiu. laŭ la tradicio, reprezentas elstaran regionon, forto de la nacio, tiel la flago de la Respubliko montras klare la harmonion de la granda Hispanio".*

Do, laŭ tiu difino la viola koloro reprezentas Kastilion kaj pli konkrete, la unua grupo kiu luktis kontraŭ la povo de la reĝoj en Hispanio: la Komunumanoj de Kastilio. Ĉi tiu grupo de nobeloj kaj burĝuloj de Kastilio luktis kontraŭ la reĝo Karolo la 1-a en la jaro 1520. Tradicie la koloro de Kastilio kaj ankaŭ de la kastiliaj komunumanoj estis viola.



Tradicia flago de la Komunumoj de Kastilio

Rilate la "*kastelan kronon*" temis pri krono atingata de la soldato kiu sukcesis engrimpi la muregojn de malamika kastelo okaze de lukto. Do, temis pri krono donita kiel premio al simpla soldato, normale tiu kiu unue engrimpis muregon ne estis oficiro aŭ nobelo, sed soldato. Tiel, la Respubliko uzis la solan kronon kiu povus esti atingota de plebano.

La hispana respubliko daŭriĝis ĝis la jaro 1939, kiam la generalo Franko venkis en la intercivitana milito de Hispanio kaj denove oni adoptis la ruĝan kaj flavan flagon, kvankam la tri-kolora flago ankoraŭ estis uzata de la Registaro de la Hispana Respubliko en la ekzilejo ĝis la jaro 1977.



# La angulo de la blazonoj:

# *NIKARAGVO*




La sendependiĝo de la eksaj britaj kolonioj en Nord-Ameriko, fine de la 18-a jarcento, estis imitinda ekzemplo por la tiamaj hispanaj kolonioj en la centraj kaj sudaj regionoj de tiu kontinento. Do, ekde la komenco de la 19-a jarcento, tiuj hispanaj kolonioj sopiris atingi sian sendependencon.

La ideo de la unuaj aktivistoj estis krei komunumojn de sendependaj ŝtatoj federaciitaj en unu pli granda politika ento, do simile al tio kio okazis en Usono, tie 13 unuaj kolonioj kreis respublikon. Tion mem oni proponis en Centr-Ameriko. De la jaro 1822 ĝis 1823 la tiamaj hispanaj provincoj de Gvatemalo, El-Salvadoro- Nikaragvo kaj Kosta-Riko sendependiĝis el Hispanio kaj ili samtempe rifuzis la ideon eniri en la ĵus kreitan Meksikan Imperion. En la jaro 1823 reprezentantoj de tiuj landoj renkontiĝis en Gvatemalo kaj deklaris, ke *ili sendependiĝis el Hispanio, de Meksikio kaj de kiu ajn alia ŝtato.* La nova lando nomiĝis "Unuiĝintaj Provincoj de Centr-Ameriko", oni aprobis tuj novan flagon kaj blazonon.

Tamen la ideo unuigi tiujn novajn landojn en ununuran ŝtaton definitive restis forgesita post la sendependiĝo de Nikaragvo, Honduro kaj Kosta-Riko en 1838, Gvatemalo en 1839 kaj fine El-Salvadoro en 1841.






Flago kaj Blazono de la Unuiĝintaj Provincoj de Centr-Ameriko

Tiu unuaj flagoj kaj blazono restis kiel modeloj por la simboloj de tiuj postaj novaj landoj sendependigitaj. Tiel, preskaŭ sur ĉiuj flagoj de la landoj de Centr-ameriko aperas la koloroj blua kaj blanka, nur Kosta-riko aldonis kroman ruĝan strion. Same okazis rilate la blazonon.




Flago de Nikaragvo

Ni parolu hodiaŭ pri la blazono de Nikaragvo, kiu esence estas tre simila al tiu de la Unuiĝintaj Provincoj de Centr-ameriko. Dekreto de la Prezidanto José Zelaya López de la jaro 1908 kreis la flagon kaj blazonon de Nikaragvo, bazitaj ambaŭ sur tiuj samaj simboloj de la Unuiĝintaj Provincoj de Centr-ameriko.

Ene de triangulo, kiu reprezentas la egalecon kaj honestecon de la patrujo kaj ties institucioj, troviĝas kvin vulkanoj inter du maroj. Tiuj kvin montoj reprezentas la kvin centr-amerikajn provincojn. La maroj aperantaj sur la blazono estas la Kariba Maro kaj la Pacifika Oceano, inter kiuj troviĝas Nikaragvo.


Aperas sur la montoj ruĝa frigia ĉapo, reprezentanta la liberecon, el ĝi eliras blankaj lum-radioj. Super ĝi, ĉiel-arko kovras la montojn kaj la ĉapon, ĝi reprezentas la vojon sekvotan de la lando por trafi sian celon. Ĉirkaŭ la triangulo aperas en oraj literoj la jena enskribo: *“República de Nicaragua – América Central”* (Nikaragva Respubliko – Centra Ameriko).




Legu jam aperintajn numerojn de nia revuo ĉe:

[www.esperanto.ac/vento](http://www.esperanto.ac/vento)










# Mallongaj informoj pri V.E.N.T.O.

## Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo

Ni tutkore dankas la afablan akcepton de la legantoj de nia revuo kaj flag-amantoj rilate la antaŭan numeron 4-an de nia revuo. Pli ol 1.300 homoj legis ĝin en nia ret-adreso: www.esperanto.ac/vento Jen la statistikoj de legantoj de nia jam publikigitaj revuoj:




Nia samideanino Cristina BOLLINI jam transskribis la maŝin-skribitan libron de Jaroslav KLIMENT *"Heraldiko kaj Veksilologio: Terminaro en Esperanto"* per komputila dokumento, sendube tiu nova teksto estos utila bazo por la aktualigo de la libro. Nia itala amikino ankaŭ sciigas al ni, ke ŝi deziris verki etan manlibron (itala-esperanta) pri la ĉefaj reguloj de Heraldiko.

# Kiel kunlabori kun **VENTO**:

- ✓ Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo Esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

- ✓ Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.


- ✓ Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

- ✓ La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni rievas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

- ✓ Memoru, ke niaj elektronika adreso estas: cordoba@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:
*Revuo VENTO*
*Apartado de Correos 3142*
*E-14080 Córdoba (Hispanio)*

**VENTO** aperas tri-foje en la jaro (aprilo – aŭgusto – decembro).

# *Humuro*




Notu la novan adreson de nia revuo: cordoba@esperanto.ac

La adreso estis afable havigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La poŝta adreso daŭras esti valida, jen ĝi:

Revuo VENTO. Apartado de Correos 3142. E-14080 Córdoba (Hispanio).

Artikoloj, kritikoj kaj kiu ajn kunlaboro estos ĉiam bonvena.




*Je la nomo de la Homaro*

***sen-finan dankon***

*al tiuj kiuj luktas kontraŭ la kron-viruso COVID-19*

Sur la fotografaĵo ĉinaj kuracistoj flirtigas sian flagon kun la jena teksto:

PARTIA KOMITATO DE SEKCIO DE INTERNA MEDICINO

UNIA HOSPITALO DEPENDA DE LA TONGJI MEDICINA KOLEGIO

CENTRO-ĈINA UNIVERSITATO DE SCIENCOJ KAJ TEKNIKO